# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k94.html




Nº 94ª

Aprilo 2016

Redaktore

# Kial daŭrigi? Kion fari?

Oni eble sin demandas kial ni ade venas antaŭ vi, leganto, se la sociala bazo de nia asocio, HALE, estas tiom malgranda. Ĉu iu legas nian karan magazinon, ***Kajeroj el la Sudo***? Nu, se oni devas juĝi tion laŭ la nombro de la reagoj, aŭ leteroj al ni senditaj, la respondo estas, ke ne.

Do, kial insisti? Nu, estas ne malfacila demando respondi: unue, ĝi estas valora publikaĵo, kiun oni faras en Hispanio. La sola tute sendependa el iu ajn ideologio aŭ skolo. Tio kaŭzis en la estinto, ke la malmultaj samideanoj, kiuj apogis la asocion kaj la magazinon publike, ĉesis apogi nin. Sed tio estas unu el la plej altiraj aferoj, por ke ni daŭre publikigos ĝin. Fakte, ni ne verkas por estanto, sed por estonto, ĉar ni ne ŝatas tion, ke oni verkis por la estinto. Esperanto havu estonton, ne vivu ĝi en la pasinton.

Alian demandon, kiun oni faris al mi laste estas, ke mi publikigas la magazinon kun eraroj, kiuj poste malaperas. Nu, por mi estas grave, ke la magazino aperu akurate —eĉ se lastjare mi tion ne sukcesis atingi—, kaj erarojn poste oni solvos, ĉefe pro tio, ke neniam mankas tiuj *bonkoraj* samideanoj, kiuj notigas erarojn ĉie, eĉ se ili ne ekzistas, sed mi tamen dankas ilian helpon, ĉar laŭ mi la sola kritiko, kiu estas malbona, estas tiu, kiu ne ekzistas. Ankaŭ pro tio mi publikigas la magazinon iom post iom, laŭ la monato. Unue per HTML-a formato, kaj poste, kiam ĝin mi jam finis redakti, mi republikigos per PDF-a formato.

Pri la hispana politika scenejo, estas malmulte da ŝanĝoj en lastaj monatoj. Eble tio, ke la plej voĉdonata partio rifuzas starigi registaron,



kaj tion rigardas la aliaj partioj, kiuj jam feliĉiĝis pri la afero, kiel insulton, bojkoton, ktp, pro tio, ke ili jam vidis, ke ili ne povos starigi novan registaron, ankaŭ. La socialisma Pedro Sánchez, gvidanto de PSOE unue diris, ke li ne volas paroli kun PP, sed je la momento, kiam mi tajpas tion ĉi, li decidis, ke li parolos al ĉiuj, pro tio ke la Reĝo de Hispanio petis al li, ke li starigu registaron. Ĉu li sukcesos? Dume, estas akraj kritikoj al Pedro Sánchez kontraŭ lia emo pakti kun PODEMOS, ĉar estas multe da timo inter anoj de aliaj partioj (inkluzivante aliaj socialistoj).

Kaj nun komuna civitano demandas sin, ĉu nova balotado ne estos plej konvena al la interesoj de civitanaro, kiu vidas, ke partioj politikaj prifajfas nin. Tial mi opinias, ke ni ĉiuj prifajfu pri partioj politikaj. Oni ŝanĝu la sistemon, por ke la sistemo ne ŝanĝu nin laŭ sia intereso.

Vivu la Respubliko!

# Kanto de kantoj

Kaj la Tria Respubliko jam funkcias! La revo de la Soldato jam plenumiĝis. Pro tio, li ne kandidatiĝis je la veninta balotado, sed li reiris en sian vilaĝon instrui geinfanojn ĉe sia lernejo, kio estas tio, kion li plej ŝatas en la mondo.



En la ĉefurbo restis multaj amikoj liaj, sed liaj prelegoj mankis. Li diris, ke sia posteno estis en la lernejo, ne en Parlamento. En tiu loko, li asertis, jam estas homoj, kiuj scias multe, kaj li estis nur simpla lernejo-instruisto.

Kaj li daŭre lernigis homojn legi, kaj skribi, kaj pensi, kaj studi tion, kion aliaj pensas.

Kaj kiam li jariĝis, li tediĝis iomete ĉe li, kiam klasoj jam finiĝis ĉiun tagon, kaj sekve li verkis librojn. "Tiumaniere", li diris, "mi ankoraŭ povas instrui tiujn, kiuj jam forlasis la lernejon ĉar ili pligrandiĝis". "Sed", diris la edzino, la Pastrino, "se ili jam foriris el lernejo, tio signifas, ke ili jam scias ĉion, kion oni devas scii".

"Oni neniam scias ĉion, kion oni scias", li respondis. "Vidu min: je mia aĝo mi ankoraŭ lernas ĉiun tagon".

"Kaj kion vi lernas?"

"Mi lernas multe da aferoj, kiujn mi ne havis tempon lerni antaŭ ol nun. Ekzemple, kiel oni pasigu tempon. Kion oni esperas de societo, kaj kion ĝi donas al ni, kaj kion oni devas redoni al ĝi".

"Sed tio estas tro filozofia, edzo", diris lia edzino. "Vi nur vivu vian vivon, kiel ĉiuj".

"Mi ne povas, virino".

"Kial ne?"


"Vidu: la tagon, kiam mi faras same kiel ĉiuj faras, mi komencos timi. Oni devas debati, lerni kaj instrui pere de debato. Kaj oni devas situiĝi en la loko de la alia debatanto. La tutan tempon. Sed sen perdi vian pozicion, ĉar oni devas esti serioza".

Kaj per tiu kaj similaj sintenoj tempo pasis tra la animo de La Soldato. Nun li legis la ĵurnalon ĉiun tagon, kaj li pasigis multe da horoj partoprenante diskutejojn kaj socialajn retojn.

Sed homoj laciĝis pri publikaj aferoj, kaj fojfoje oni devis fari konteston por ke politikistoj daŭre servu la Respublikon, kaj ne servu sin pri ĝi.

# Nubuloj kaj nubistoj

Super nuboj oni sentas sin pli **proksime** al ĉielo. La nubomaro ŝajnas farita el kotono. Ĉu ne plaĉus al vi vivi en nubo? Dormi sur ĝin kvazaŭ ĝi estus plej komforta matraco, sen io ajn, kiu ĝenos al vi, eĉ ne la vento bruo, ĉar vi vojaĝas per ĝi... Tio estus eĉ pli bone ol vojaĝi per globo, pli bone ol per plej komforta vualŝipo, ĉar oni ne devas zorgi pri vua-loj. Eĉ se oni devas vojaĝi nur tien, kien la vento blo-vos onin, kio estas vere same kiel la ceteraj homoj faras, kvan-kam se via nubo pluvas troe, vi povas fali... Sed kiam via nubo tuŝas altan monton, vi povas lasi ĝin kaj iri sur alian pli grandan nubon, kies pluvo ne finigu ĝin tiom facile... Kaj tiumaniere vi povos vojaĝi tra la tuta mondo, nutrita de sunradioj dumtage, de akvo dumnokte, ĉiam rigardante la ŝanĝantajn pejzaĝojn sube, kaj la stelojn supre dum la nokto. Diru: ĉu plaĉus al vi vivi en nubo?



Malfeliĉe multaj el niaj kuncivitanoj vivas en sia privata nubo. Ili ĉiuj havas nomon, kaj nomiĝas PSOE, PP, PODE-MOS, CIUDADANOS... El ĉiu el ili, nubistoj, tio estas, tiuj, kiuj vivas pere de nuboj, promesas ĉion per siaj kampanjoj, sed se ili sukcesas atingi povon ni emas kredi tion, kion ili rakontas al ni: oni ne povas plenumi siajn promesojn ĉar tiuj, kiuj estis an-taŭ ili en povo faris ĉion tiom malbone, ke ili ne plu havas mo-non aŭ ri-medojn ple-numi ilin.

Nun ni estas en speciala postbalota tempo, kaj ĉiu nubo flugas alte kaj klare en ĉielo, ankoraŭ graveda pri promesoj, kiuj poste ili ne plenumos, kvankam eble ili neniam volis plenumi, ĉar tio signifus labori..., kaj politikistojn oni ne pagas laŭ sia laboro, sed laŭ tio, kion ili mem decidis, ke ili volas ricevi. Ni, tiuj, kiuj ne vivas en nubo kaj per nubo, povas fari nur unu aferon: ne voĉdoni.

Jes, tio ŝajnas maldemokra-tia, sed ĝi ne estas tia: fakte tio

estas la plej demokratia afero, kion oni povas fari, ĉar balotoj en Hispanio ne estas demokratiaj, sed partikratiaj, se ne fingrokratiaj. Ĉar komuna civitano ne decidas pri tio, kiu la kanditato estos kaj kiu ne. Kiu estas la Prezidento de la Registaro, kaj kiu ne. Tion decidas partioj politikaj, tio estas, la homoj, kiuj plej influas en ili, ne nome de ni, la popolo. Kaj tial, kiam ili jam estas en povo, elektitoj ne dediĉas sin al zorgo pri la intereso de tiuj civitanoj, kiuj voĉdonis por ili, sed pri la intereso de la partio, kiu elektis ilin, sen konsideri la opcion oponi sin al la ordonojn de la partio, kiam ili estas kontraŭ la intereso de la popolo, kiu voĉdonis por ili, sed favore al la intereso de la partio, kiu elektis ilin, ĉar se ili faras tion, ili povas esti eksigitaj el siaj partioj aŭ almenaŭ ne esti en ties listo la venontan fojon. Tial por parlamentanoj, voĉdoni konscience, eĉ se nia konstitucio postulas tion de ili, estas utopio anstataŭita en la praktika vivo de **fia** kaj **troiga disciplino pri voĉdon**o, kiu estas eŭfemismo por diktatoreco de la plej grava homo en la partio, kiu inkluzivis ilin en sia listo. Kaj tio ne estas akceptebla de civitano, kiu estas tiu, kiu pagas la salajron de ili ĉiuj per siaj impoŝtoj.




Ĉiu ricevita voĉdono donacas unu eŭron al ties partio, kio ŝajnas al mi tre maldeca kaj trompo, ne gravas kiom laŭleĝa tio estas. Ne vane estas ili, deputitoj, sklavoj de politikaj partioj tiuj, kiuj faras leĝon en ĉi tiu lando. Ĉar por ĉiu laborposteno oni devas havi titolon aŭ trejnado, sed ĉiu ajn analfabeto povas iĝi parlamentano kaj pripensi, diskuti kaj aprobi leĝojn eĉ se li aŭ ŝi ne komprenas ilin, se li aŭ ŝi ricevis sufiĉe da voĉoj. Kvazaŭ ĝi estis voĉdonata kleriĝi ilin.

Tial mi rekomendas al vi, ke **se vi ne volas pagi por la servo, kiun vi ne ricevos, ne voĉdonu**. Ĉesu vivi en nubo. Malfaciligu aferojn al nubistoj, tiuj kiuj vivas el la nubo kiel nubuloj loĝas, tuj nevrozuloj, kiuj vivas en nubo da revo kaj iluzio, kiuj igas ilin kredi, ke politikistoj zorgos pri civitanoj sen tio, ke ĉi tiu postulu al ili akre. Sindetenado de 90% finos tiun senhonton institucian ombre de Konstitucio, kiun oni intence interpretas mensogade kaj alarme turpe. Se vi amas vian landon, kiu estas ni ĉiuj, sindetenu.

# La 100ª UK en Francio

Lastan someron mi ĉeestis la kongreson de Lilo, la 100an. La partoprenantoj estis multaj kaj ĉarmaj, kaj mi denove vidis kelkajn samideanojn, kiujn mi ne vidis de antaŭ longe.




Sed mankis al mi kelkaj gesamideanoj, tamen, kiuj ne plu estas inter ni. Bedaŭrinde, esperantistoj averaĝe estas maljunaj, kaj de kongreso al kongreso kelkaj el ni mortas, kaj lasas grandan truon, kiun ne facile oni replenas.



La urbodomo de Lilo

Sed kongresoj estas ankaŭ ŝanco, por ke malnovaj geamikoj denove renkontu kaj klaĉu pri aferoj, kiujn ili faris de la lasta fojo, kiam ili trovis unu la alian.

Bedaŭrinde jam pasis multe da tempo de la kongreso, kaj mi ne havas multon diri pri ĝi. Espereble venontfoje mi rakontos pli al vi, pri la Kongreso de Nitra, la 101ª, se mi finfine sukcesos ĉeesti.

# Ripetata balotado

Ŝajnas homoj nervozaj en Hispanio pri tio, kio okazas pri balotado: kio okazos ĉi foje?

Nu, laŭ mi nenio okazos. En Hispanio neniam okazas ion ajn. Ĉiuj zorgas nur pri sia propra afero, kaj neniu pri ĉies. Ni senzorgas pri aferoj ĉiesaj, kaj tiujn, kiuj protestos, oni sendas feken. Tia estas la sinteno de hispanoj pri demokratio. Pro tio demokratio neniam ekzistis en nia lando, kaj neniam ekzistos, ĉar ĝi ne venos senpage.

Jam tedas min aŭdi, ke **ĉi tiu monarĥio estas demokratia**... Diable, kiam oni voĉdonis pri tio, ĉu ni volas monarĥion ian ajn, ĉu ne? Ĉu mi estis eksterlande kiam tio okazis? Sed eĉ se ĝi estus demokratia, ĝi mortis denaske je 1978 ĉar la faktopovoj ne estas apartigitaj. Ankaŭ ne ekzistas honesteco en la sinteno de tiu demokratio, ĉar minimume oni povas esperi, ke sinjoroj deputitoj estu honestaj kaj voĉdonu tion, kion ili konsideras lej bona por la popolo, kiu pagas ilian salajron. Sed tio ne okazas. Al niaj deputitoj oni ne supozas honestecon sufiĉan por ke ili voĉdonu laŭ sia konscienco, sed oni ordonas al ili tion, kion la koncerna partiestro ordonos ilin voĉdoni. Kaj sekve ili ne povas voĉdoni laŭ siaj lojala kaj rekta scioj kaj komprenoj konsciaj. Tiurilate mi memoras, ke deputito Jozefo Bono deklaris sin publike katolika, apostola kaj romiana, kaj tamen voĉdonis favore al leĝo pri aborto, tiel, kiel lia gvidanto tiama, S-ro Rodríguez Zapatero, ordonis lin. Tio pruvas, ke li ne voĉdonis konscience, sed male. Kaj tio kontraŭdiras la konstitucian ordonon esprimita per artikolo 67-2ª: "La anoj de Ĝeneralaj Kortumoj ne estu ligitaj de imperativa komando", tio estas, ke oni ne povas diri al ili tion, kion ili devas voĉdoni. Sed oni ja diras tion al ili, kaj se ili ne obeas, oni punas ilin ekonomie, aŭ oni forpuŝas ilin el sia partio, tiel ke oni povas voki ilin transfuĝuloj poste. Tio signifas, ke oni perfortas ankaŭ artikolon 71-1-an: "Deputitoj kaj senatanoj ĝuos protekton pri siaj opinioj esprimitaj dum la ekzerco de siaj funkcioj". Se oni komprenas, ke voĉdoni konscience estas esprimi sian opinion pere de voĉdono.

Sed imagu vi realan scenejon, tiu, en kiu leĝoj estas tute plenumitaj. Tiu, en kiu en Hispanio estas vera demokratio en kiu gesinjoroj deputitoj voĉdonas laŭ siaj konsciencoj: ne estas loko por pakto, interkonsento aŭ aranĝo inter partioj politikaj: deputitoj voĉdonas laŭkonscience, ne la siaj ideologioj. En tiu ŝtato povas okazi, ke kaj antiklerikaj kaj ateaj deputitoj povas esti kon-

vinkitaj de argumentado serioza de alia deputito pro tio, ke estas bone doni pli da mono por privata lernigado en ekleziaj lernejoj, ĉar ties eduka laboro estas bona kaj sufiĉa por lernigado de infanoj por kiuj la ŝtato ne povas konstrui lernejojn publikajn, ĉar ĝi ne havas la monon necesan. Aŭ malpermesi tion, ke oni postulos monon por viziti monumenton regatan de Katolika Eklezio, ĉar artaĵoj apartenas al ĉiuj popolanoj, kaj almozoj el dikredantoj sufiĉas por ilia zorgado. Aŭ tio, ke malgraŭ ideologio bonisma kaj pacema heredita aŭ propra, deputito voĉdonu favore al nuligo de leĝo, kiu konsideras nerespondecaj ĵure infanojn, ĉar necesas eduki ilin kiel respondecajn civitanojn, kaj ili devas kompreni tion, ke ĉiu rajto havas koncernan devon. Rezume: se oni plenumus la leĝon, eĉ se ĝi estas neperfekta pro nedemokrata, paktoj inter partioj malmankus, ili estus nenecesaj ĉar homoj bonvolaj voĉdonus favore al ni, kaj ne favore al siaj partioj, kaj ni jam havus koheran registaron de kelkaj monatoj, eble ne gvidatan de iu ajn gvidanto partian, eble eĉ ne de deputito, kio estus dezirenda pro tio, ke la laboro de parlamento estas fari leĝon kaj tiu de registaro estas regadi, kio neniel rilatas al leĝofarado. Nek al tio, ke oni garantiu ĵurecon aŭ neĵurecon de ago homa, ĉar tio estas devo de juĝisto kaj ne de leĝofaranto aŭ reganto. En demokrata socio, aldone, juĝigi ĵuriston korespondas al civitanoj pere de balotado, ĉar leĝo devas fonti el popolo, kaj ne el registaro, malsame al tio, kio okazas en diktatoreco.

Pro tio ĉio tute sengravas al mi, ke balotado estos refarata. Oni diras, ke kostas multe da mono fari ilin denove. Eble la kosto estos malpli granda ol tio, kion oni malŝparas en helpo al futbalteamoj, kiuj elspezas tiom da mono, milionoj da eŭroj, akirante futbalistojn, kiujn ni tute ne necesas, se ne por nutri narcisismon de prestiĝo al teamoj. Sed se balotado kostas tiom da mono, oni neniam devus fari ilin, ĉar sengravas ĉu tiu partio aŭ alia venkas, ĉar ili ambaŭ faros same, do ni povas ŝpari tion, ke ili primokos nin, la popolon, ĉiun kvarjaron farante tion, kion ili volos favore al siaj ideologioj, partioj kaj persona profito, sed neniam favore al tiu popolo, kiun ili diras, ke ili reprezentas. Tial mi ne voĉdonas al ili, kaj mi opinias, ke ankaŭ vi ne devas fari tion. La tagon, kiam oni povos forpuŝi de la povo laŭleĝe tiun, kiu ne plenumu tion, kion li aŭ ŝi promesis pere de politika programo, mi repensos la aferon. La tagon, kiam iu ajn povos sinprezenti kiel kandidato, mi repensos la aferon. Dume, vi bonvolu ne malŝparigu mian tempon. Ĉar tiuj balotadoj, kiujn oni faris ĝis nun, kaj ĉiuj, kiujn oni faros sen ŝanĝi ties regulojn, estas ekzakte la sama balotado.

# Mi estis en La Sesa de Kubo

Mi anktaŭvidis semajnon de kongreso en la kuba insulo, sed mia frustro dekomence venis, kiam mi lernis, ke estas nur semajnfino, de la 18ª ĝis la 22ª de novembro.

Mi hazarde vizitadis la insulon de unu monato kaj duono antaŭe, ĉar mi ankaŭ deziris partopreni la junularan kongreson, kiu bedaŭrinde ne okazis pro manko da partoprenantoj, laŭ tio, kion oni diris al mi. Mi ĝuis la etoson kaj geografion de la bela insulo, tamen, kaj vizitadis Kamagŭej-on, Trinidadon kaj aliajn interesajn kaj allogajn urbojn. Kaj ĉefe Havanon, la plej grava kaj brila urbo el la tuta Insulo.

Mi devas konfesi, ke la kuba vivmaniero havas malmulte oferti al eŭropano: eĉ por bazaj nutraĵoj, kiel ovoj kaj lakto, oni devas vici ĉe vendejoj. Se vi estas riĉulo, vi ne havos problemojn en Kubo, ĉar vi iros en kvinstelan hotelon, kaj oni provizos pri ĉio por vi. Mi tion vidis dum la Kuba UK antaŭ kelkaj jaroj. Sed se oni deziras kubiĝi kun kubanoj, partopreni ilian ĉiutagan vivon, oni certe trovos la problemojn, kiun kubanoj trovas ĉiun tagon. Tamen, mi trovis ankaŭ neelteneblajn aferojn, kiujn mi ne vidis aliloke: Kubo subtenas duoblan moneron: malatvaloran por kubanoj, kaj dudekvinovble valoran por eksterlandanoj. Ekzistas vendejoj, kie kubanoj ne povas aĉeti, kaj aliaj por kubanoj. Se eksterlandano deziras viziti kubanan vendejon, ne estas problemo: oni povas eĉ aĉeti aferojn..., se ankoraŭ restas.

Sed la etoso estis ĉarma kaj amika, kaj ni pasigis belan tempon kun niaj kubaj geamikoj. La koncertoj estis interesaj (aparte tiu pri trio, gitara instrumento kun tri kordoj), kaj estis bele vidi malnovajn amikojn.



La faraono

# Ĉapitro 43ª

La okcidentan limon de Egipto sur longo da pli ol cent geografiaj mejloj formas muro de kalkaj montetoj, nudaj, interrompataj de intermontoj, kelkcenton da metroj profundaj. Ĝi kuras sur la bordo de Nilo, de kiu ĝi foriras jen unu mejlon, jen unu kilometron.

Se iu surgrimpus iun el la montetoj kaj turnus la vizaĝon al la nordo, li vidus plej strangan pejzaĝon. Malsupre, dekstre, li havus mallarĝan, sed verdan herbejon, tranĉitan de Nilo; maldekstre -- senliman flavan ebenaĵon, semitan de blankaj aŭ brikokoloraj makuloj.

La unutoneco de la pejzaĝo, la incitanta flaveco de la sablo, la varmego kaj, antaŭ ĉio, la senfina senlimeco -- jen estas la ĉefaj ecoj de la libia dezerto, sin etendanta oriente de Egipto.

Sed ĉe pli detala rigardado, la dezerto ŝajnus malpli unutona. Ĝia sablo ne kuŝas plate, sed formas vicon de sulkoj, kiuj similas grandegajn akvajn ondojn. Tio estas kvazaŭ ondanta maro, kiu glaciiĝis.

Kiu havus la kuraĝon iri sur ĉi tiu maro unu horon, du, iafoje tutan tagon, tiu trovus alian vidaĵon. En la horizonto aperas montetoj, iafoje ŝtonegoj kaj senfundaĵoj de plej diversaj formoj. Sub la piedoj la sablo fariĝas pli kaj pli malprofunda kaj el sub ĝi komencas eliĝi kalka ŝtonego kvazaŭ kontinento.



Efektive tio estas kontinento, eĉ lando, en la mezo de la sabla maro. Apud la kalkaj montetoj oni vidas valojn, sur ili la fluujojn de la riveroj kaj riveretoj, pli malproksime ebenaĵon kaj en ĝia mezo lagon kun kurbaj bordoj kaj kava fundo.

Sed sur tiuj ĉi ebenaĵoj kaj altaĵoj ne kreskas eĉ unu herba trunketo, en la lago ne estas eĉ unu akva guto, en la rivero fluas nenio. Tio estas pejzaĝo, kun

plej diversaj formoj de la tero, sed de kiu forkuris la tuta akvo; tute sekigita, pejzaĝo malviva, kie ne nur pereis ĉiuj kreskaĵoj, sed eĉ la fruktodona tavolo de la tero disfalis en polvon aŭ eniĝis en la ŝtonegojn.

En tiuj lokoj okazis io plej terura, kion oni povas imagi: la naturo mortis, restis nur ĝia skeleto kaj polvo, kiujn pli kaj pli konzumas la varmego, kaj la vento transĵetas de unu loko al alia.

Post tiu ĉi malviva, neenterigita kontinento sin etendas ree maro sabla, sur kiu tie ĉi kaj tie oni vidas pintajn konusojn, kiuj leviĝas iafoje ĝis unuetaĝa alto. La pinto de ĉiu monteto estas kronita de malgranda tufo de grizaj folioj, kovritaj de polvo, pri kiuj estas malfacile diri, ke ili vivas; ili nur ne povas morti.

Sed Tifono, la monarĥo de la dezerto, rimarkis ĝin kaj malrapide komencis superŝuti ĝin per la sablo. Kaj ju pli alten penas grimpi la kreskaĵo, des pli alten leviĝas la konuso de la sufokanta sablo. La tamarindo, falinta en la dezerton, havas aspekton de dronanto, kiu vane etendas siajn manojn al la ĉielo.

Kaj ree disfluas la senfina flava maro, kun siaj sablaj ondoj kaj agoniantaj kreskaĵoj, kiuj ne povas morti. Subite aperas ŝtonega muro, en ĝi fendoj, kvazaŭ pordegoj...

Nekredebla afero! Post unu el tiuj pordegoj oni vidas vastan valon de verda koloro, multe da palmoj, bluajn akvojn de lago. Oni vidas eĉ sin paŝtantajn ŝafinojn, bovojn kaj ĉevalojn; malproksime, sur la deklivoj de la ŝtonegoj kuŝas amfiteatre tuta urbeto, kaj sur la suproj brilas blankaj muroj de temploj.

Tio estas oazo, kvazaŭ insulo en la mezo de la sabla oceano.

Tiaj oazoj en la tempo de la faraonoj estis tre multenombraj, eble kelkdeko. Ili formis ĉenon de insuloj en la dezerto, ĉe la okcidenta limo de Egipto. Ili estis en interspaco de dek, dek kvin, dudek geografiaj mejloj de Nilo, kaj okupis dekkelkon aŭ kelkdekon da kvadrataj kilometroj.

Kantataj de la arabaj poetoj, la oazoj, en la realeco, neniam estis vestibloj de la paradizo. Iliaj lagoj estas plej ofte marĉoj; el la subteraj fontoj fluas varma akvo, iafoje malbonodora kaj abomene sala; la kreskaĵoj ne povas esti eĉ komparataj kun la egiptaj. Tamen ĉi tiuj rifuĝejoj ŝajnis paradizo al la vojaĝantoj en la dezerto, kiuj trovadis en ĝi iom da verdaĵo por la okulo, iom da malvarmeto, malsekeco kaj daktiloj.

La loĝantaro de ĉi tiuj insuloj en la sabla oceano ne ĉie estis egala: de kelkcento da homoj ĝis dekkelko da miloj, depende

de la supraĵo. Ĉiuj ili estis aventuristoj egiptaj, libiaj, etiopiaj, aŭ iliaj posteuloj. En la dezerton forkuradis homoj, kiuj povis perdi plu nenion: malliberuloj el la minejoj, krimuloj persekutataj de la polico, kamparanoj troŝarĝitaj per la servuto, aŭ laboristoj, kiuj preferis danĝeron ol laboron.

La pliparto de la forkurantoj mizere pereadis en la dezerto. Kelkaj post teruraj turmentoj sukcesis atingi oazon, kie ili pasigis vivon mizeran, sed en libero, kaj ĉiam estis pretaj invadi Egipton por malhonesta akiro.

Inter la dezerto kaj Mediteraneo sin etendis longa, ne tre larĝa zono de fruktodona tero, loĝata de diversaj gentoj, kiujn Egiptanoj nomis Libianoj. Unuj el ili sin okupis je terkulturo, aliaj je fiŝkaptado aŭ marveturado; sed en ĉiu gento estis aro da sovaĝuloj, kiuj preferis la ŝteladon, militon aŭ rabadon, ol regulan laboron. Ĉi tiu bandita loĝantaro senĉese pereis en mizero aŭ militaj aventuroj, sed senĉese ankaŭ kreskis de la alfluo de Sardanoj (Sardinianoj) kaj Ŝakaluŝoj (Sicilianoj), kiuj en tiu epoko estis ankoraŭ pli grandaj barbaroj kaj rabistoj, ol la enlandaj Libianoj.

Ĉar Libio estis najbara al la okcidenta limo de Malsupra Egipto, la barbaroj ofte rabis la teron de lia sankteco kaj estis terure punataj. Sed konvinkiĝinte, ke la milito kontraŭ Libianoj kondukas al nenio, la faraonoj aŭ pli ĝuste la pastroj elektis alian politikon. Ili permesis al libiaj familioj loĝiĝi ĉe la apudmaraj marĉoj de Malsupra Egipto; la banditojn kaj aventuristojn ili varbis en la armeon kaj faris ilin bonegaj soldatoj.

Tiamaniere la ŝtato garantiis al si por ĉiam pacon ĉe la okcidenta limo. La polico, limaj gardistoj kaj kelke da regulaj regimentoj ĉe la kanopia brako de Nilo sufiĉis por konservi ordon inter unuopaj libiaj rabistoj.

Tia stato de la aferoj daŭris ĉirkaŭ cent okdek jarojn; la lastan militon kontraŭ Libianoj kondukis Ramzes III, kiu detranĉis grandan amason da manoj al la falintaj malamikoj kaj alportis Egipton dek tri mil sklavojn. De tiu tempo neniu timis atakon de Libio, kaj nur ĉe la fino de la regado de Ramzes XII-a la stranga politiko de la pastroj ree ekflamigis en tiu lando la fajron de la batalo.

Ĝi eksplodis en jenaj cirkonstancoj:

Lia ekscelenco Herhor, la milita ministro kaj ĉefpastro, pro la kontraŭstaro de lia sankteco ne povis fari kun Asirio traktaton pri divido de Azio. Dezirante tamen, konforme al la avertoj de Beroes, konservi longan pacon

kun Asirio, Herhor certigis Sargonon, ke Egipto ne malhelpos ilin militi kontraŭ Azianoj orientaj kaj nordaj.

Ĉar la rajtigito de la reĝo Assar ŝajnis ne konfidi al la ĵuroj, Herhor decidis doni al li materian pruvon de bona volo kaj por tiu celo ordonis tuj eksigi dudek mil dungitajn soldatojn, plejparte Libianojn.

Por la eksigitaj soldatoj, tute senkulpaj kaj ĉiam fidelaj, la decido estis malfeliĉo preskaŭ egala al mortpuno. Antaŭ Egipto malfermiĝis danĝero de milito kontraŭ Libio, kiu absolute ne povis doni rifuĝejon al tia amaso da homoj, kiuj kutimis nur al la militaj ekzercoj kaj komforta vivo, ne al la laboro kaj mizero. Sed Herhoron kaj la pastrojn ne haltigis tiaj bagateloj, kiam tion postulis la ŝtata racio.

Cetere, en la realeco, la dispelo de la libiaj dungitoj donis grandajn utilojn.

Unue: Sargon kaj liaj kunuloj subskribis kaj ĵuris provizoran traktaton kun Egipto por dek jaroj, dum kiuj, laŭ la profetaĵo de la ĥaldeaj pastroj, devis pendi malbonaj sortoj super la sankta tero.

Due, la dispelo de dudek mil homoj el la armeo alportis al la reĝa trezorejo ŝparon de kvar mil talentoj, kio estis tre grava.

Trie, la milito kontraŭ Libio ĉe la okcidenta limo estis kluzo por la heroaj instinktoj de la kronprinco kaj por longa tempo povis deturni lian atenton de la aliaj aferoj kaj de la orienta limo. Lia ekscelenco Herhor kaj la plej alta kolegio saĝe supozis, ke pasos kelke da jaroj, antaŭ kiam Libianoj, elĉerpitaj de la embuskaj bataloj, volos peti la pacon.

La plano estis prudenta, sed la aŭtoroj faris unu eraron: ili ne antaŭsentis, ke en Ramzes dormis genia generalo.

La eksigitaj libiaj regimentoj, rabante survoje, tre rapide atingis sian patrujon, tiom pli ke Herhor ordonis ne fari al ili malhelpojn. La unuaj venintoj, haltinte sur la libia tero, komencis rakonti al siaj sampatrujanoj aferojn nekredeblajn.

Laŭ iliaj rakontoj, diktataj de la kolero kaj persona utilo, Egipto estis nun tiel malforta, kiel en la epoko de la invado de Ĥiksosoj, antaŭ naŭcent jaroj. La faraona trezorejo estis tiel malplena, ke la monarĥo egala al dioj devis eksigi ilin, Libianojn, kiuj ja formis la plej bonan, se ne la solan parton de la armeo. Cetere la armeo preskaŭ ne ekzistis, apenaŭ plenmano da soldatoj ĉe la orienta limo, soldatoj malbone disciplinitaj.

Krom tio inter lia sankteco kaj la pastroj regis malpaco. Oni ne pagadis la salajron al la laboristoj, la kamparanoj estis sufokataj per la impostoj, la popolaj amasoj estis pretaj ribeli, se nur ili trovos helpon. Sed tio ne estis ankoraŭ ĉio: la nomarĥoj, kiuj estis iam sendependaj estroj, kaj iafoje rememoris la antaŭajn rajtojn, hodiaŭ, vidante la malfortecon de la registaro, sin preparas por renversi la faraonon kaj la plej altan pastran kolegion!...

Ĉi tiuj novaĵoj, kvazaŭ aro de birdoj, disflugis en la libia lando kaj tuj trovis kredon. La banditoj kaj barbaroj ĉiam estis pretaj al la atako, tiom pli hodiaŭ, kiam la eks-soldatoj kaj eks-oficiroj de lia sankteco certigis ilin, ke rabi Egipton estas tre facila afero. La riĉaj kaj prudentaj Libianoj ankaŭ kredis al la elpelitaj soldatoj, ĉar jam de multe da jaroj ne estis por ili sekreto, ke la egiptaj nobeluloj malriĉiĝas, ke la faraono ne havas povon, ke la kamparanoj kaj laboristoj ribelas de la mizero.

Entuziasmo eksplodis en la tuta Libio. La forpelitajn soldatojn kaj oficirojn oni salutis kiel portantojn de bonaj novaĵoj. Kaj ĉar la la lando estis malriĉa kaj ne havis provizojn por akcepti la gastojn, oni do decidis militon kontraŭ Egipto, por plej baldaŭ liberiĝi de la venintoj.

Eĉ la ruza kaj saĝa libia princo Musavasa sin lasis kapti de la ĝenerala fluo. Lin tamen konvinkis ne la elmigrantoj, sed iaj respektindaj kaj seriozaj homoj, verŝajne agentoj de la plej alta egipta kolegio.

Ĉi tiuj altranguloj, ofenditaj, kiel ili diris, kontraŭ la faraono kaj pastroj, kaj nekontentaj je la stato de la aferoj en Egipto, venis Libion de la maro, sin kaŝis de la popolaĉo, evitis rilatojn kun la forpelitaj soldatoj, kaj klarigis al Musavasa, sub sigelo de la plej granda sekreto kaj kun pruvoj en la mano, ke nun estas la plej bona momento ataki Egipton.

— Vi trovos tie — diris ili — neelĉerpeblan trezorejon kaj provizejon por vi, por viaj homoj kaj por la nepoj de viaj nepoj. Musavasa, kvankam ruza militestro kaj diplomato, lasis sin trompi. Kiel homo energia, li tuj proklamis sanktan militon kontraŭ Egipto, kaj havante pretajn milojn da militistoj, li sendis al la oriento unuan korpuson, sub la komando de sia dudekjara filo Tehenna.

La maljuna barbaro konis la militon kaj sciis, ke tiu, kiu volas venki, devas agi rapide, ekbati la unua.

La preparoj de Libianoj daŭris nelonge. La eks-soldatoj de lia sankteco venis sen armiloj, sed ili konis sian metion, kaj en tiuj tempoj ne malfacile estis kolekti

armilojn. Kelke da rimenoj, aŭ pecoj da ŝnuro por la ŝtonĵetilo, lanco aŭ pinta bastono, hakilo aŭ peza bastonego, unu sako kun ŝtonoj, alia kun daktiloj -- jen estis ĉio.

Musavasa donis al sia filo du mil eks-soldatojn kaj ĉirkaŭ kvar mil libiajn aventuristojn, ordonante al li plej rapide invadi Egipton, rabi ĉion, kion ili trovos, kaj prepari provizojn por la vera armeo.

Jam delonge tia movado ne regis en la dezerto. El ĉiu oazo iris grupo post grupo de tiaj mizeruloj, ke kvankam ili estis preskaŭ nudaj, ili meritis ankoraŭ la nomon de ĉifonuloj.

Sin apogante sur la opinio de siaj konsilantoj, kiuj antaŭ unu momento estis oficiroj de lia sankteco, Musavasa tute prudente supozis, ke lia filo rabos kelkcenton da kamparoj kaj urbetoj inter Terenuthis kaj Senti-Nofer, antaŭ kiam li renkontos pli gravajn egiptajn fortojn. Fine oni komunikis al li, ke ĉe la unua sciigo pri la movado de Libianoj, ne nur forkuris ĉiuj laboristoj de la granda vitrofarejo, sed eĉ cedis la taĉmentoj, okupantaj la malgrandajn fortikaĵojn en Soĥet-Hemau, sur la bordoj de Sodaj Lagoj.

Tio estis tre bona antaŭsigno por la barbaroj, ĉar la vitrofarejo estis grava fonto de enspezoj de la faraona trezorejo.

Musavasa faris la saman eraron, kiel la plej alta pastra kolegio: li ne divenis la militan genion de Ramzes. Kaj okazis io eksterordinara -- antaŭ kiam la unua korpuso atingis la ĉirkaŭaĵojn de Sodaj Lagoj, jam estis en tiu loko la dufoje pli granda armeo de la kronprinco.

Oni ne povis riproĉi al Libianoj mankon de antaŭzorgemo. Teĥenna kaj lia stabo aranĝis tre bone esploristan servadon. Iliaj spionoj multfoje estis en Melcatis, Naucratis, Sai, Menut, Terenuthis kaj transnaĝis la kanopian kaj bolbitinan brakon de Nilo. Sed nenie ili renkontis egiptajn taĉmentojn; la leviĝo de Nilo, pensis ili, paralizis la marŝon de la egiptaj fortoj, kaj preskaŭ ĉie ili vidis la panikon de la loĝantaro, kiu, ne atendante, forkuradis de la apudlimaj kamparoj.

Ili do alportis al sia ĉefo plej favorajn sciigojn. Kaj dume la armeo de la kronprinco, malgraŭ la leviĝo de Nilo, ok tagojn post la ekmarŝo atingis la bordon de la dezerto kaj, provizita per akvo kaj nutraĵo, malaperis inter la montoj de Sodaj Lagoj.

Se Teĥenna povus kiel aglo leviĝi super la tendaron de siaj bandoj, li rigidiĝus, vidante, ke en ĉiuj intermontoj de la ĉirkaŭaĵo sin kaŝas egiptaj regimentoj, kaj ke baldaŭ, baldaŭ lia regimento estos ĉirkaŭita de ĉiuj flankoj.



# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/hale/kels94.pdf

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k94.html

# Enhavo


Redaktore: Kial daŭrigi..........2

Kanto de kantoj ......................3

Nubuloj kaj nubistoj..............4

La 100ª UK de Francio...........6

Ripetata Balotado...................7

Mi estis en la sesa de Kubo .9

La Faraono, ĉ. 43ª................10


**Kovrilo**: Venkinto en balotado estas sola, ĉar neniu volas paroli kun li.


ISSN **1886-1997** aŭ **1886-1938** (se printite)
Depósito legal: **Z-2398-88**

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**


Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo ne mistraktu personon.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

***Konto ES30 2100 4617 4122 0011 5275.***

***Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.***

***Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com***

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp kaj Scribus.